

Stine Andresen,
Dolĉa sekreteco

tradukita de Manfredo Ratislavo

Mi estas via, estas vi
en mia kor', kaj tio ĉi
sekreto estas nia.
Sekreto dolĉa estas ĝi,
ĉar scias ĝin nur ambaŭ ni
kaj certe ne alia.

Mi longe ne plu vidis vin!
Aĥ, estu jam de l' tago fin'!
Foriĝu jam la suno!
Feliĉaj horoj venas ja
por ni, dum nokte brilas la
stelaro kaj la luno.

Karulo, kiam en la dom'
profunde dormas ĉiu hom',
mi sidos atendante
vin enĝardene. Venu vi
la pordon - ĉar bruetas ĝi -
mallaŭte malfermante!

*Traduko de la Frisa poemo "Swet hiamelkhaid" de STINE ANDRESEN (geb. Jürgens, *1849-12-23 – †1927-05-13) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2000-07-31.*

Arg-15-24 (2014-02-14 13:14:47)

Pri la poetino vidu la vikipedajn retejojn http://de.wikipedia.org/wiki/Stine_Andresen kaj http://frr.wikipedia.org/wiki/Stine_Andresen.